

HUNGARA BULTENO – 1a numero

Pri agado, eventoj, programoj de Hungaria Esperanto/HEA

Nia unua plej grava dokumento venis de la prezidanto István Szabolcs.

Karaj Gesamideanoj,

Ĝojplene mi tenas en mia mano la longe atenditan bultenon de la Hungaria Esperanto Asocio. Mi dankas por la iniciato kaj organiza laboro de D-ro Imre Ferenczy, mi dankas al nia ĉefredaktoro Anjo Amika kaj al ĉiuj kunlaborantoj, kunhelpantoj.

La informilo postulas kontinuan senlacan laboron tamen ĝi ofertas belan okupiĝon al ni ĉiuj. Artikoloj kaj novaĵoj ĉu fakaj ĉu movadaj bonvenas en la redakcejoj. Komence la informiloj aperos neregule en nefiksita amplekso, depende de la alvenintaj informoj. Se ni rigardas antaŭen niaj celoj estas ambiciaj. Ni volas atingi ĉiujn esperantistojn hungarajn, ni volas trovi agemajn simpatiulojn al nia afero. Se ni rigardas eĉ multe pli antaŭen ni volas havi kontakton kun ĉiuj fortoj en la lando kaj trans la landlimo en najbaraj regionoj, kiuj celas antaŭenigi kaj akceli la diskonigon kaj konon de Esperanto kune kun ĝia utiligo por praktikaj aŭ idealismaj celoj. Por formuli tiujn forajn celojn mi prunteprenis vortumon de S-ro Stefan MacGill.

Multaj niaj membroj pensas ke la informilo povos servi ankaŭ porvarbadajn celojn, havante ankaŭ iom da informoj en la hungara lingvo. Mi kundividas tiun opinion.

Antaŭ miaj okuloj estas vico de enhavoriĉaj numeroj kun diversaj rubrikoj. Kion oni imagi povas tion oni povas ankaŭ plenumi.

Nia trajno ekstartis kaj kuras sur reloj tra la tuta lando, alkuras kunligante al ĉiuj niaj membroj. Bonvolu legi, uzi kaj ĝui ĝin! Kun miaj bondeziroj: Szabolcs István prezidanto de HEA.

La dua informo havas la rezultojn de la renovigo de la estraro de HEA:

Estimataj membroj de HEA!

Karaj Esperantistoj!

Porinfome mi anoncas, ke la 10an de oktobro en la OKISZ oficejdomo ((1146 Budapest, Thököly 58-60. disvolviĝis la jubilea estrar-renoviga deligita asembleo, kies rezulton laŭ la subaj mi plusendas.

La detala enhavo de la protokolo sekve de la subskriboj estos legebla ankaŭ en nia nova hejmpaĝo.

Elektitaj honoraj prezidantoj:

Károlyné Ködmön
Katalin Faragó
Mária Eszes
D-ro. József Halász

Elektitaj honoraj membroj:

László Gados
István Sutka

La KOMITATO de al asocio:

Prezidanto: István Szabolcs
Ĝenerala vicprezidanto: Mónika Forgács
Vicprezidanto pri ekonomio, afergvidanto: János Nagy
Membroj de la Komitato: Gyöngyi Mézes,
Miklós Simonyi

Kontrolkomisiono:

Prezidanto: Judit Récsányi
Membroj de la komisiono: Károlyné Ködmön
Tötösné Zsuzsanna Gados

Estime:

János Nagy
vicprezidanto pri ekonomio
afergvidanto